

Ora Ĵurnalo

Numero 19, Junio – Julio 2019



Al la tuta mondo:

Bonvenon al la verda Gotenburgo!

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2	”Arkta Ŝterno” kaj ”ridmevo” klarigas.....	29
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Ingrid Vallin trovis kantbirdojn	29
Espe-Porko meditas... ..	3	Sveda kanto: Gaja birdeto	30
Kantu kun ni	4	Pri la sinjorino Nääs. Revoj realiĝis sur la heredaĵo de Nääs.....	30
Celebro de la Nacia Tago en Gråbo.....	4	Nääs kaj Otto Salomon	30
La sveda nacia himno	5	Iomete pri alia eksterlanda partopreninto ..	31
Esperanto-Sabato 15 junio: Robert Hannah ..	5	Hinda lernanto en Nääs	32
Skickat till ett antal EU-parlamentariker.....	7	La suda alo de Nääs	32
Memore al sinjoro Fajsi Károly	8	Kuriozaĵo pri Nääs	34
Plurlingva diservo ĉe la samea kabano	9	1979 – filmfaro.....	34
Pentekosta Tago.....	10	Aktuale en 2019	34
Ni kantis Må din väg gå dig till mötes	10	Vänhem tiame kaj nuntempe	35
La sveda SEF-kongreso 2019	11	La homoj en Nääs.....	36
Krister Kieselman pri la jida gramatiko	12	La luddomo – Lekhuset.....	36
Mireille Grosjean prelegis pri stepoj.....	13	Mi volus doni al vi florojn!	37
Leif Nordenstorm pri minoritataj lingvoj	13	Labortagoj en Varberg	37
La jarkunsido de SEF / SEFs årsmöte.....	14	Ruĝa muzeo, flava malliberejo, banejo en Varberg	38
La fino de la kunsido	15	”Bockstensmannen”	39
Micke Englund kaj lia kunludanto ludis	16	Ŝajne la ŝanĝo de laborloko vigligis!	40
Agneta Järnlström kaj Olof Pettersson distris	17	Charlie Chaplin instruas Esperanton.....	41
Stokholm’ en la kor’	17	Roger Nilsson trovis svedajn strangaĵojn.....	42
Bona instruisto laborigas la gelernantojn... ..	18	Pli el la somera kurso	42
Laŭdon al la organizantoj kaj al la kuiristo! ..	18	Ekskursoj proksime al Gotenburgo.....	43
Bildoj de la somera kurso en Gotenburgo ...	19	Blovas vent’	43
Oe, oe.....en la ŝipo.....	21	”Vinga”	43
Bildoj el la lasta tago de la kurssemajno.....	22	Tjolöholm	44
Saluton al la Gotenburga kverko.....	25	Tips från Inga Johansson.....	44
Kvar leteroj de la somera kurso	26	La malnova ringo de Ingegerd Granat.....	45
La fiero vaporŝipo ”Ångaren Bohuslän”	28		
Sädesärlan – Blanka motacilo	28		

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com. Fina paĝaranĝo – kaj en tiu ĉi numero lingva kontrolo –: Andreas Nordström, arendsiian@hotmail.com. Lingva perfektigo de kelkaj tekstoj: Folke Wedlin.





Espe-Porko meditas...

...kaj iomete hontas pro kelkaj eraroj en la pasinta numero.

Sed – se ne estas eraroj, la legantoj malofte skribus al Ora Ĵurnalo. Ni bonvenigas kontaktojn kun vi.

- ✧ Unue Margareta Andersson, kiu havas grandan konon pri birdoj, atentigis nin ke estas miskompreno pri la aspekto de birdoj. Ne estas la arkta ŝterno sed la ridmevo sur la bildo en la maja numero. Do ni enmetis klarigan dialogon inter la du birdoj en ĉi tiu numero. Krome Margareta substrekiis ke la arkta ŝterno apartenas al la familio ŝternoj, ne al la meva familio.
- ✧ Due Kaarlo Voionmaa skribis la 27an de majo:
*Dankon pro la gazeto!
La historio de Finnlando estas animskua legaĵo.
Mi rimarkis kelkajn erarajn informetojn: la operacio Barbarossa ne komenciĝis en julio 1941 sed la 22-an de junio de 1941. Mi memorus ke la nombro de militinfanoj senditaj el Finnlando al Svedio estis 72 000, ne 90 000. Trie, la Sovet-Unio ne sukcesis kapti/forrabi duonon de Finnlando en la du militoj (1939–40 & 1941–1944) sed "nur" 12 procentojn de la finnlanda areo. Unu el la plej grandaj perdoj estis la perdo de la urbo Viipuri. La karela popoldiro spite al ĉiuj afliktoj estis: "Ĝojo supren eĉ se la koro trempitiĝis fare de plorado."
Kun amikaj salutoj!
kaarlo voionmaa, svedfinnulo*
- ✧ Ne ĉiun tagon esperantokluboj havas viziton de parlamentano. Ni havis! Robert Hannah, kiun Sascha de



Germanio inspiris skribi proponon pri esperanto en la gimnazio, vizitis nin la 15an de junio. Tre pedagogie li informis pri la laboro en la komisionoj kaj en la parlamento.

- ✧ Al la somera kurso en Gotenburgo 20 personoj aliĝis al tri niveloj: komencantoj, daŭrigantoj kaj al la konversacia kurso. Kune kun la tri instruistoj – Sten, Inga kaj Andreas ni estos 23. Elvira el Pollando venos nur je la fino de la kurso. Do mi esperas ke eĉ la komencantoj kuraĝos paroli esperanton kun Elvira.
- ✧ Ĉi tiu numero estas duobla numero kaj por junio kaj por julio. Post la somerkursoj 24–28 junio ni renkontiĝu ĉe kafejoj – post promenoj tra la urbo al interesaj historiaj vidindaĵoj: merkrede 10 julio, ĵaŭde 22 aŭgusto kaj vendrede 13 septembro.
- ✧ La Libro-Foiro okazos 26–29 septembro. Ĉi tiun fojon la Gotenburga klubo organizos la tuton sen SEF, sed kompreneble ni informos la vizitantojn pri kluboj kaj aktivecoj en tuta Svedio.
- ✧ Libertempa vojaĝo ne devas kosti tro! En la Ora Ĵurnalo Ingegerd donas ekzemplojn pri interesaj celoj.
- ✧ Inga sciigis nin, ke la Ondo, rusa gazeto, informas ke ili konas numerojn 14, 15 kaj 16 de Ora Ĵurnalo. Ora Ĵurnalo ŝajne havas flugilojn.
- ✧ Raportojn kaj rakontojn vi trovos en ĉi tiu numero: pri la SEF-kongreso, pri Nääs, pri Varberg kaj je la fino vi havas rakonton de Ingegerd pri "La Malnova Ringo".
- ✧ Havu ĝojan someron! Ni revidu unu la alian en aŭgusto. Ĝis! /Siv

Kantu kun ni:

<https://www.youtube.com/watch?v=Gse60azS5gE>



Somere en suna kamparo
ni iras tra l' verda arbaro
ho, for estas nia zorgaro
Kun ĝojo kantu do! Haló! Haló!
Ekiru nun al rava sun',
ne sidu hejme ĝis aŭtun'!
Ni marŝas for kun gaja kor'
kaj ĝuas de la florodor'.
Somere en suna kamparo,
Kun ĝojo kantu do! Haló! Haló!

Celebro de la Nacia Tago, la 6an de junio, en Gråbo

La estraro de la gotenburga esperanto-klubo
kombinis kunsidon kun celebros de la Nacia

Tago. Jen la bildoj, kiujn Ingegerd faris:





La sveda nacia himno

(En la sveda: <https://www.youtube.com/watch?v=9LiN57nfjFw>)

Vi alta, libera, multaĝa Nordland',
vi gaja, silenta, ho vi bela!
Saluton al vi, nia plej kara land',
al via verdherbej' kun sun' ĉiela!

Vi tronas fiere sur granda memor'
eĥinta kun glor' de bord' al bordo.
Vi estas kaj restas eterna kun glor'.
Ke vivu mi kaj mortu en la Nordo!

Esperanto-Sabato 15 junio: Robert Hannah, parlamentarano (L), vizitas la gotenburĝan klubon



Inga interrete trovis la proponon de Robert Hannah, pri esperanto en la gimnazio (sur la ekrano).

Robert elkreskis en Tynnered, Gotenburgo.
Pri tio li skribis libron – "Potatisskallen".

La titolo alludas al la pejorativa esprimo
"svartskalle" (nigra cerbujo) dirite pri
enmigrintoj el sudaj landoj, sed ĉar li estas

naskita en Svedio – la lando de terpomoj – li nomas sin "potatisskalle" (terpoma cerbujo). La libro temas pri "kulturo pri honoro" kun perforto pro honoro, negativa evoluo de kelkaj antaŭurbaj partoj kaj ankaŭ pri la rajtoj de HBTQ-personoj – ĉiuj aferoj pri kiuj Robert intense laboras.

Eĉ se la ŝancoj estis nefavoraj al li, knabo de gotenburga problemlena antaŭurbo – li nun estas juristo kaj parlamentano por la Liberaloj.

Robert substrekas ke la laboro de parlamentano estas sola laboro. Lunde kaj vendrede ne estas laboro en la parlamento. Do estas tempo por skribado de proponoj al la komisiono, demandoj al ministroj, kunlaboro pri partiaj skriboj – kaj nun por vizito al Esperanta asocio.

Ĉiu parlamentano ja apartenas al aparta komisiono, Robert al Civilutskottet, kiu traktas loĝadon, konstruadon, konsumantajn aferojn, heredaĵojn, geedziĝon, nomleĝon... eble mi forgesis ion.

La metodo influi la politikon estas uzo de

- 1) skribaj demandoj
- 2) interpelacioj
- 3) kontakto kun la amaskomunikiloj.

Margot Wallström ŝercas, dirante ke Robert "abonas" pri demandoj al ŝi pri la Mez-Oriento, de kie la familio de Robert origine venas. La spektro de liaj demandoj estas vasta – de la deziro pri sveda konfirmo de la popolmurdo de armenoj 1915–1917 – ĝis la hodiaŭaj aferoj pri IS.

Robert listigas siajn strebojn tiele:

- 1) kontraŭbatali perforton pro honoro
- 2) aferoj pri loĝado
- 3) plibonigo de la antaŭurboj

Cetere... la afero de edzigo/edzinigo de infanoj devas esti haltigita.

La amaskomunikiloj ne ofte raportas pri la duono de la svedoj, kiu devenas de aliaj landoj.

Sekvis interparolo kiel agi por enmeti Esperanton en la gimnazion. Konsiloj:

- Invitu personon de Skolverket (la ŝtata administracio pri lernejoj) kaj argumentu por ke esperanto troviĝu sur la listo de elekteblaj lingvoj en la gimnazio.
- Kunlaboru kun iu gimnazio, kiu povus trovi almenaŭ kvin estontajn esperanto-lernantojn.
- Kunlaboru kun aliaj politikaj partioj por kune labori por esperanto.
- Skribu al viaj lokaj parlamentaranoj – vi ja elektis ilin.

Kaj:

Daŭrigu la laboron igi la svedaj EU-parlamentaranojn kunlabori kun grupoj en la parlamento por levi la lingvan problemojn al eŭropa nivelo.

Robert finis per citaĵo kiun oni diras devenas de Mahatma Gandhi:

<i>First they ignore you</i>	Unue ili ignoras vin
<i>then they laugh at you</i>	poste ili priridas vin
<i>then they fight you</i>	poste ili primilitas vin
<i>then you win</i>	poste vi gajnas.

Do, ni ĉiuj dankas al Robert pro lia prelego pri la ĝenerala parlamenta laboro kaj pri sia aparta laboro.

Ni deziras al li sukceson en sia grava laboro!

/Siv



Skickat till ett antal EU-parlamentariker

Till dig som ska representera Sverige i EU!

11 juni 2019

Göteborgs Esperantoförening vill informera dig, som nu ska representera oss i EU om följande:



Dagens språkpolitik i EU är långt ifrån demokratisk. De stora språken tränger undan de små. Du kan medverka till en mer demokratisk språkordning i EU, genom att förorda att ESPERANTO blir ett av EUs officiella språk. Esperanto är ju det moderna latinet, som vi påstår är den minsta gemensamma nämnaren för så gott som alla EU-länder. Många av de språk som talas i EU har ju inslag av latin, om inte annat så i den mängd internationella ord, som ingår språken. Eftersom EU är ett planerat språk finns inte de svårigheter, som varje nationellt språk har, i form av undantag från regler. Esperanto är oerhört smart konstruerat och är tidsbesparande. Det finns en rik litteratur och en mängd läroböcker, ordböcker och tidskrifter från hela världen. I Wien, där Esperanto-Akademien har sitt säte, finns en samling på närmare 50 000 olika titlar. Esperanto är inget litet språk, som många tycks tro i Sverige. Ingenstans är det majoritetsspråk, men det är spritt i ca 120 länder.

Esperanto har globala ambitioner och vill vara ett brospråk mellan olika kulturer. Det är användbart i alla sammanhang och stöder tanken på att alla ska få tala sitt eget modersmål. Dör ett språk dör en kultur.

En gång var det Frankrike, som hindrade Esperanto att bli ett officiellt språk i FN (dåvarande NF). Idag är Frankrike ett av de länder som mest arbetar för att Esperanto ska bli ett EU-språk. Tag kontakt med fransmännen och se vad ni tillsammans kan åstadkomma.

Då språkläraren Lars Forsman under 15 år – fram till 2002 – hade esperantoterminer på Karlskoga folkhögskola för svenskar och icke-svenskar, förordade han att man skulle börja med att utbilda EU-tolkarna. Efter fyra månader skulle de vara helt kapabla att översätta mellan esperanto och modersmålet. Esperanto som spindeln i nätet skulle hindra att ord med dubbelbetydelse eller olika ideom skulle orsaka missuppfattningar.

Om varje land – först på försök – sedan på riktigt – skulle införa esperanto som skolspråk, skulle på sikt ledamöterna slippa att förlita sig på tekniken och kunna tala direkt med varandra på kaféer och i korridorer. Allt kanske inte avgörs i plenisalar. Dessutom ligger ju en fredstanke bakom skapandet av Esperanto, liksom demokratitanken att alla ska ha rätt att kunna kommunicera med varandra.

Gustav Fridolin, Robert Hannah (2017) – och kanske någon mer – har lagt motioner till den svenska riksdagen om möjligheten av att införa esperanto på gymnasiet. I min kommun, Lerum, har det funnits esperanto som frivilligt ämne under 12 år – tills PISA-rapporten satte stopp. Alla timmar behövdes för basämnena.

Mycket pengar skulle sparas om Esperanto blev huvudspråk i EU och FN.

Läs mer på Göteborgs Esperantoförenings hemsida www.esperanto-gbg.org

Hela Esperanto-Sverige har samma uppfattning, men den här gången blev det Göteborgsföreningen som agerade.

Esperantoföreningen i Göteborg genom:

Siv Burell, ordf. 070-721 34 79 siv.burell@gmail.com

och *Ingegerd Granat*, v. ordf. 073-502 53 32 ingegerd.granat@gmail.com

Memore al sinjoro Fajsi Károly de Raita Pyhälä, Finnlando

KÁROLY FAJSZI (1911–2004) estis hungara poŝtovicisto, kiu esperantiĝis okaze de la Budapeŝta Universala Kongreso en 1966. Post sia emeritiĝo en la 1970aj jaroj li komencis kolekti Esperantajn librojn, gazetojn, revuojn, insignojn, standardojn k.a. Tiutempe troviĝis ankaŭ Esperantaj pakumoj por alumetoj, ĉokolado, cigaredoj. Li havigis al si ankaŭ la skribotablon de Kalocsay. Ĉio tia kaptis lian intereson.



Lia tri-ĉambra loĝejo en budapeŝta etaĝdomo konstruita en la fino de la 19a jarcento ekpleniĝadis de ĉio Esperanta. La libroj kaj aliaj aĵoj engrimpis ĝis la

plafonoj. Lia edzino permesis tion, eĉ fariĝis helpanto en la kolektado. Post kelkaj jaroj jam estis bezonataj du pliaj helpantoj por la katalogado. La unua parto de la katalogo, 542 paĝoj, aperis en 1991. Ankaŭ la dua parto estas aperinta, sed la precizan jaron mi ne scias.

En la 1990aj jaroj la ekonomia situacio en Hungario ŝanĝiĝis kaj ne plu estis facile kolekti esperantaĵojn. S-ro Fajsi petis eksterlandajn esperantistojn kunporti aŭ

sendi aldonaĵojn al lia kolektaĵo, li volis kompletigi, perfektigi.

Mi vizitis la hejmon de gesinjoroj Fajsi, kiam mi bezonis Esperantajn tradukojn el la fabeloj de H.C. Andersen. La endoman ŝtuparon kovris araneaĵoj, sed en ilia loĝejo daŭris diligenta ordiga laboro.

S-ro Fajsi afable disponigis siajn librojn al bezonantoj, kiuj rajtis tie sidiĝi kaj eklegi. Nun de tio pasis preskaŭ 30 jaroj.

En majo 2019 mi revizitis Budapeŝton kaj volis vidi la Fajsi-kolektaĵon en la Nacia Biblioteko de Fremdlingva Literaturo. Por tio oni devas aranĝi akcepton almenaŭ unu tagon antaŭ la vizito.

Nun oni rajtas legi kaj pristudi la aĵojn sur balkono super iama bela dancejo, nun legosalono, sed el tiu kolektaĵo oni ne pruntas.

La kolektaĵo enhavas 12 000 librojn, 1 000 binditajn periodaĵojn, centojn da relikvaĵoj, plurmil presaĵetoj, krome ankaŭ alilingvaj eldonaĵojn pri Esperanto.

Mi ĝuis mian viziton sed demandis, kial la nomo de Fajsi ne vidiĝas sur muro aŭ pordo. Mi trovis statuetojn pri Zamenhofo, portreton pri la fama poeto Kalman Kalocsay sed ne bildon pri esperantisto Fajsi Károly.

Raita Pyhälä



Plurlingva diservo ĉe la samea kabano, la Pentekostan tagon



Fotoj de Ingegerd kaj Siv.

Plovis kaj ventis, sed tamen 18 personoj venis al la diservo de la paroĥo de Angered, kunlaborante kun la Samea Societo de Gotenburgo. La Esperanto-Societo estis invitita (anonco en la numero 18 de Ora Ĵurnalo).

Ĉe la lago Trollsjön (la lago de ogroj) estis fajro kun kafkaserolo en la mezo. La diservon gvidis la pastro Charlotta Nylund (apud la gitarludanto). Krom la sveda ankaŭ estis tekstoj en la nordsamea lingvo, la finna kaj... Esperanto. Mi legis la tekston el la Agoj de la apostoloj, ĉapitro 2, versoj 1–11. Ni kantis en la sveda kaj la samea. Pro la vetero ni poste kafumis en la kabano. /Siv




Pentekosta Tago

Apostlagärningarna – La agoj de la apostoloj

Ĉapitro 2, la unua verso:

- 1: Kaj kiam venis la Pentekosta tago, ili ĉiuj estis unu-anime en unu loko.
2. Kaj subite venis el la ĉielo sono, kvazaŭ blovego de forta vento, kaj ĝi plenigis la tutan domon kie ili sidis.
3. Kaj al ili aperis dis-irantaj langoj kvazaŭ el fajro, kaj sidigis sur ĉiun el ili.
4. Kaj ĉiuj pleniĝis de la Sankta Spirito, kaj komencis paroli aliajn lingvojn, kiel la Spirito donis al ili parolpovon.
5. Kaj en Jerusalemo tiam loĝis piaj Judoj el ĉiu nacio sub la ĉielo.
6. Kaj kiam aŭdiĝis tiu sono, la homamaso kunvenis kaj miregis, ĉar ĉiu aparte aŭdis ilin paroli per lia propra dialekto.
7. Kaj ĉiuj konfuziĝis kaj miris, dirante unu al alia:
Rigardu! Ĉu ne estas Galile-anoj ĉiuj tiuj parolantoj?



8. Kiel do ni aŭdas ĉiu en sia dialekto, en kiu ni naskiĝis?
9. Partoj kaj Medoj kaj Elamanoj, kaj loĝantoj en Mezopotamio, Judujo, Kapadokio, Ponto kaj Azio...
10. Frigio kaj Pamfilio, Egiptujo kaj la partoj de Libio apud Kireno, kaj pas-loĝantaj Romanoj, Judoj kaj prozelitoj...
11. Kretanoj kaj Araboj – ni aŭdas ilin paroli en niaj lingvoj... la mirindaĵojn de Dio.

Ni kantis *Må din väg gå dig till mötes* en la nordsamea

(jen la melodio en la sveda plus en la sveda signolingvo: https://www.youtube.com/watch?v=KFUu_oE_8c0)



Gehppes mátkki sávvat dutnje
bálggis rádnán, biekkat linsin,
beaivvádat mii niera ligge dus.
Arvi šattuidat nai čáhce jus.
Dasságo oaidnalit.
Ipmil doallá,
gal du doallá giedastis.

Ingegerd fotis.





La sveda SEF-kongreso 2019 okazis 31 majo – 1 junio en la Popolkultura Centro de Hjorthagen en Stokholmo



Iomete pli ol 30 personoj partoprenis. La kluboj en Stokholmo kaj Upsalo planis kaj bone realigis la kongreson. La bildo pri Medborgarhuset estas el la programlibreto. Krom la jarkunvenoj estis prelegoj. La kvar prelegantoj estis prezentitaj jam en la februara numero de La Espero. Ili estis:

Mireille Grosjean, la prezidanto de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj). Ŝi loĝas en Svislando kaj vizitis nin en 2007, kiam estis Esperanta ekzameno en Lesjöfors.

Krister Kiesel estas sveda matematikisto, kiu membras en internaciaj akademioj. Li loĝas en Upsalo.

Leif Nordenstorm estas direktoro de la teologia kursejo Fjellstedtska skolan. Ankaŭ li

loĝas en Upsalo kaj prizorgas la Esperanto-Eldonejojn.

Tatu Lehtilä, la plej juna de la kvaropo, estas asistanto en la faksekcio pri lingvistiko en la Stokholma universitato. Li ankaŭ estas la prezidanto de la Stokholma Esperanta klubo.

Krister Kieselman prelegis pri la jida gramatiko

Krister Kieselman estas profesoro pri matematiko. En Vikipedio oni povas trovi "Fakaj verkoj en Esperanto: Matematiko". Tie estas verkoj de Krister Kieselman ekz. Matematika termino Esperanto-angla-franca-sveda kaj Matematiko translimen.

Pri Krister Kieselman mi antaŭ multaj jaroj aŭdis ke li instruis matematikon al ĉinaj lernantoj, sed la lingvo estis problemo. Oni ofte ne bone komprenas ĉinojn, kiuj parolas la anglan en la ĉina maniero.



Pro tio Krister unue devis instrui Esperanton por ke ili havu komunan kompreneblan lingvon.

Nun li estis la unua preleganto de la kongreso, kaj lia temo estis "La jidogramatiko de L.L. Zamenhof kaj liaj kvin planlingvoj".

En Bialistoko 70 % de la loĝantaro parolis la jidan dum 200 jaroj, sed la parolata jida preskaŭ ne estas dokumentita. Eble oni rigardis la jidan kiel ĵargonon – ne veran lingvon. – Ĝi estas ja judgermana dialekto, parenca al la germana.

Zamenhof ne nur *priskribis* la jidan gramatikon li ankaŭ trovis regulojn, kiuj povis esti elektitaj kiel normigaj reguloj. Ne nur estis unu klara jida lingvo, sed diversaj en diversaj areoj. Troviĝis ekzemple unu vario en

kiu la vortordo pli similas al la sveda ol la germana. Jido kompreneble importis hebreaĵajn vortojn. La patro de L.L. Zamenhof preferis ke oni parolu la rusan, sed la patrino parolis la jidan, almenaŭ ekstere en la stratoj.

Nuntempe oni en Svedio povas studi la jidan nur en unu universitato – en Lund.

Paralele kun sia laboro pri la jida Zamenhof ankaŭ verkis gramatikon pri sia Universala lingvo – Esperanto. Pri la prononco Zamenhof preferis la litovajn sonojn al la polajn. Fakte Zamenhof ellaboris *kvin* versiojn de Esperanto, antaŭ ol li estis preta. Fari majstran verkon postulas longdaŭran laboron.

Siv

Mireille Grosjean prelegis pri la vivo en centraziaj stepoj



Esti la "rektoro" de la esperanto-instruistoj de la tuta mondo estas tasko, kiu kunportas vojaĝojn – eternajn vojaĝojn. Per la transsibiria fervojo Mireille atingis Mongolion, landon kun stepoj kaj manko de arboj. Dormi en jurto (nomata gero de la mongolanoj) estas aparta sperto! Ekstere povas esti ŝafoj, bovinoj, ĉevaloj kaj kameloj. Duono el la mongoloj ankoraŭ estas nomadoj. Sur la stepo la naturo servas kiel neceso. Por ne ĝeni unu la aliajn la virinoj kantas kaj la viroj fajfas por indiki ke la loko estas okupita.

Ĉevalo estas ja la kutima transportilo – kiel en la tempo de Ĝingis-Ĥano. Rajdante ne estas facile skribi horizontale, sed vertikale pli facilas. Tial la mongola alfabeto estas skribita vertikale. En la ĉefurbo, Ulan Bator, la rapideco estas alia ol en la kamparo – kvazaŭ en du diversaj mondoj. Oni ĉiam uzas la rusan en Ulan Bator.

Mireille pensas ke Rusio estas malbona turisma lando. En la restoracioj la menuoj estas nur en la rusa. Oni devas diveni kaj montri per la fingro al iu nekonata plado sur la menuo aŭ desegni kiun manĝon oni volus – ofte kun neatendita rezulto.

Tamen Irkutsko, unu el la plej grandaj urboj en Siberio ĉe la Bajkala lago, estas interesa.

Tie oni povas aŭdi kristanajn sonorilojn kaj vidi kristanajn tombejojn.

La hejmo de Mireille troviĝas en Svislando. Kiajn kontrastojn ŝi renkontas per siaj vojaĝoj!

Kiam ŝi skribos siajn rememorojn??? /Siv

Leif Nordenstorm prelegis pri minoritataj lingvoj

Leif Nordenstorm elkreskis en la norda parto de Svedio kaj aŭdis la finnan, la tornivalan kaj la sameajn lingvojn. Tiuj lingvoj devenas de la finno-ugraj lingvoj. La finnaj sonoj parte malsimilas al la svedaj. Ekz. la konsonantoj *k*, *t*, *p* estas elparolataj sen la spiro, kiun la svedaj analogecaj konsonantoj havas.



En la samea frazo: "Jugat go gafe" – "Vill du ha kaffe" la litero **k** (en kafo) ŝanĝis al **g** (gafe). La literoj **t** kaj **p** povas fariĝi **d** resp. **b** (almenaŭ por svedaj oreloj). Post sveda mallonga konsonanto sekvas longa vokalo kaj male. En la tornivala kaj la finna povas esti duobla longeco (muuttaa). Ekz: *muta* – lera, *muuta* – alia, *mutta* – sed, *muuttaa* – ŝanĝi. La frazo "iru en paco" havas malsamajn verbformojn se vi alparolas unu, du (validas por la samea) aŭ plurajn personojn.

Leif ankaŭ parolis iomete pri "romani chib", kiu ne estas limigita al apartaj areoj kaj sekve ne povas havi "förvaltningsområden" (administraciaj areoj). Tiel ili ne rajtas havi multe de la avantaĝoj, kiujn la sameoj kaj la turnivalanoj havas, ekz. lernejan instruadon pri sia gepatra lingvo.

U.N. diras ke malriĉeco estas manko de informado kaj nescio pri la rajtoj. Ofte la komunumoj ne sufiĉe informas – pro budĝetaj kialoj.

Por kontroli ĉu mi (Siv) ne tro multe eraris pri la diversaj lingvoj, mi telefonis al Soile. Jen ŝiaj komentoj:

Enligt min uppfattning kan *t* och *p* inte omvandlas till *d* och *b* eftersom dessa bokstäver egentligen inte finns i finskan. Men ändå heter fura *honka*, furans *hongan* och furornas *honkien*. Likaså stad *kaupunki*, stadens *kaupungin*, städernas *kaupunkien*.

Motsvarande gäller beträffande *t* och *d*, vetenskap *tieto*, vetenskapens *tiedon*.

Muuta annat, *mutta* men, *muuttaa* ändra, flytta.

Förvaltningsområden i Sverige har finskan, samiskan och tornedalsfinskan = meänkieli.

Inom dessa områden har man rätt att kommunicera med myndigheter på sitt minoritetsspråk och söka barntillsyn och äldreomsorg helt eller delvis på sitt eget språk.

Hälsningar
Soile

La jarkunsido de SEF / SEFs årsmöte



Puff Östling kaj Ann-Louise Åkerlund.

Ĉar la kongreso ĉefe estas nur sveda afero, kaj ĉar ĉiuj en la salono parolis la svedan, la jarkunveno okazis en la sveda laŭ la deziro de la gotenburga klubo.

Efter sammanträdesförhandlingar har den nya styrelsen följande utseende:

Ordförande: Puff Östling

Ordinarie ledamöter:

Ann-Louise Åkerlund, Lotta Lauritz, Olof Pettersson, Tatu Lehtilä.

Suppleant: Martin Strid

Revisorer: Per-Olof Johansson, Jill Hilford.

Revisorssuppleant: Ulrika Hoppe

Valberedning: Anita Dagmarsdotter, Anna Ritamäki.

Årsmötet 2020 kommer att äga rum i Lesjöfors och 2021 troligen i Danmark.

Intressant att läsa om klubbverksamheten under 2018. Klubbbar finns i Stockholm, Helsingborg (tyvärr läggs den troligen ner), Malmö, Göteborg, Uppsala, Norrköping.

Grupper samlas i Närke och Sundsvall.

En ungdomsgrupp håller kontakt via Skype. Något för framtiden!

Vi i Göteborg ser fram emot ett gott samarbetsklimat. Puff höll fint i trådarna under det ganska långa mötet.

/Siv

La fino de la kunsido



Per iniciato de Ingegerd Granat ni formis grandan ringon tenante la manojn **sin reciproke por montri ke ni strebas al unueco, paco kaj bona etoso.**



Ni kantis la Esperanto-himnon. Hmmm... ne facile teni la manon kaj samtempe teni paperon por legi la tekston. Almenaŭ mi devas tuj lerni ĝin parkere. /Siv

Micke Englund kaj lia kunludanto sperte ludis



Ili estis prezentitaj de Leif Nordenstorm.

La dueto distris nin per kantoj, kiun ni ofte rekonis kaj de tempo al tempo logis nin al kunkantado. Mi admiras muzikistojn, kiuj ŝajne nur spontane ludas – sen antaŭa laborego. La dueto vere imponis. Se iu demandus min pri unu kanto, kiun mi

memoras mi respondus "Sola". Tiu refreno ja preskaŭ nur enhavas unu vorton: "sola"... kaj ĉiu povas kunkanti. /Siv

Interrete mi trovis ke Kim Henriksen kaj Micke Englund kune kantas kaj muzikas en:

<https://www.youtube.com/watch?v=ITGNUubvIOc>

Mi pagis kotizon al IJK,
Sed nenio restis por la vojaĝ'
Mi pensis ke tio tute ne gravas,
Kaj iris al la voj' kun mia pakaj'
Mi levis la manon, ridetis al la ŝoforoj,
Sed neniu haltis kaj kunportis min.
Post ses horoj en pluvo kaj vento mi frostis tiel
Ĉiuj aŭtomobiloj preterpasis min tiel rapide
Kaj mi sentis min

Refreno:

Sola, sola, sola

Sentis min sola, sola, sola

Mi venis finfine al la kongreso
Kaj tie renkontiĝis kun karaj amikoj
Ni kisis, brakumis kaj estis gajaj,
Nun mi estas kun fratoj kaj fratinoj de la tuta mondo
Kaj ne

Sola, sola, sola

Sola, sola, sola

Ĉar ĉi tie mi pensas, estas bonega
Etoso, paco kaj amikeco
Kaj mi kredas ke neniu ĉi tie sin sentas
Malgaja, malbela, malamata
Kaj certe ne

Sola, sola sola

Certe ne sola, sola sola.

Poste ni ĉiuj vojaĝis hejmen
Al niaj landoj en la tuta mond'
Kaj nun mi pensas pri miaj geamikoj
Kaj sentas min iom malĝoja, malgaja
Kaj iom

Sola, sola, sola,

Iom sola, sola sola.

Imagu se ĉiuj homoj en la tuta mondo lernus Esperanton
Povu esti ke tiam neniu iam iel ie
Sentus sin

Sola, sola, sola... (ktp.)

Agneta Järnlström kaj Olof Pettersson distris nin per kantaro kun multaj "perloj"

Certe ili ofte muzikas en la Stokholma klubo.

Ni pruntis la muziklibretojn de la klubo kaj trovis kanttrezorojn. Malsupre troviĝas "Stokholm' en la kor'", la plej ŝatata kanto de mia sepjara nepo Adam, kiu kompreneble estas stokholmano kaj prefere kantas tiun kanton en Gotenburgo. /Siv

Stokholm' en la kor'

de L. Berghagen / Jan Setreus tradukis en esperanton.

Sunlumo leviĝas el maro, la vitro fariĝas topaz',
Stokholmo matene similas
Glazuron de oro sur vaz',
Kun floroj de Baltmaraj landoj, kun herboj de kverkriĉa val',
Belulo ĉe prarokaj strandoj,
Jen Melar-laga vestal'.

Refreno:

Stokholm' en la koro, kanti pri vi volas mi,
Olda en juna verdeco, urbinsular', estas vi.
El urboj mi konas en mondo, vi estas la ideal',
Pro l' amo de lago kaj maro, miksaĵo de dolĉ' kaj sal'.



shutterstock.com • 556209544



Sunlumo ekdancas sur golfo, trembrilas sur pad' kaj sur plac',
Sur ligna domaĉo de l'Sudo, sed ankaŭ sur reĝa palac'.
La fluo kun fiŝoj kaj mevoj,
Nun flustras ĉe-laga arbar',
Krepuske la sonĝoj kaj revoj,
Ekkantas pri l' urbo ĉe mar'.

Refreno... Stockholm' en la koro...

Vespere alvenis kareso, de tremo de briz' kvazaŭ kord'.
Ruĝiĝas la suno fenestre,
Sur suda kaj norda lagbord'.
Muzikon kaj ridojn ni aŭdas, de l' insulo kun la amuzej',
Glorkanto Stokholmon nun laŭdas, de l' ŝeraro al interkluzej'.

<https://www.youtube.com/watch?v=JEPvZBDOjdc> Allsång på Skansen

Bona instruisto laborigas la gelernantojn. Mireille laborigis nin.



– En grupoj ni trovu la ecojn, kiuj estas gravaj por ĉiu instruisto.

Ĉiu grupo aldonis vortojn kaj multaj akordis kun la teksto pri bona instruisto, kiun Mireille fine laŭtlegis.

Kelkaj el la proponitaj ecoj estas: saĝa, lerta, sperta, pedagogia, inteligenta, kapabla, analiza, zorgema, atentiga, ŝercema, paroliga, strukturema, klarigema, kunlaborema, entuziasma, kompetenta, afabla, fantazia, respektema, celkonscia, komunikema, inspira, aktiviga, sekura.

Kaj kelkaj frazoj: "havi ekvilibron", "esti la roko en la rivero", "reciproka respekto", "veni ĝustatempe", "respekti la gelernantojn", "mastrumi la tempon kaj la strukturon", "komuniku, ne prelegu", "plenan atenton de la grupo", "ne la sama instruado al diversaj aĝuloj".

Kiu kuraĝas instrui post tio?

Sed, ŝi ankaŭ diris, ke la gelernantoj meritas normalan instruiston... ..Ĉiu vojo iras al Romo... Memfida instruisto trovas sian vojon!

Ho bone, oni ne devas esti tute perfekta instruisto. Svedio bezonas pliajn instruistojn pri multaj fakoj, eĉ por Esperanto!!!! /Siv

Laŭdon al la organizantoj, laŭdon al la kuiristo!



Bongustan vegetaran manĝon la kuiristo faris. Li ankaŭ rakontis pri la ingrediencoj de la pladoj.

Jen ni arigas por la supeo. Poste ni diris *Ĝis revido* unu al la alia. Kelkaj tamen restis ankaŭ dimanĉe por viziti la Poŝtmuzeon en la malnova urbo de Stokholmo.

Sen la prizorgo pri la tekniko fare de Olof Pettersson, certe ne ĉio irus tiel glate.



Koran dankon al la kluboj en Stokholmo kaj Upsalo kaj la estraranoj de SEF pro bone planita kongreso!

Ingegerd kaj Siv



Bildoj de la somera kurso en Gotenburgo 24–28 junio



Dufoje tage ni kolektiĝis por kanti.



Ne estas piratoj, sed la
konversacia grupo. Ĉiuj ekhavis
novajn identecojn.

En la flava ĉambro la
progresantoj fervore laboris.



... kaj la komencantoj... rapide lernis.





Oe, oe.....en la ŝipo

de Jaques Yvart; Invito por vojaĝo, Marcel Redoulez;

Ohe'ohé du bateau (Vinilkosmo.com, <https://www.youtube.com/watch?v=2IJ2SUsG-Sw>)

Diru bela ŝipo,
Estras kies skipo?
Kia estas cia flag' ?
Se ĝi ruĝ-kaj-nigras
Kune ni formigras,
Al la horizonto-vag',
//: Oe, oe.....en la ŝipo ://

Nia ŝipo-hordo
Bordo kontraŭ bordo
Forpuŝita ja de la vent'
Ekliberigas fratojn
Rompas galerfaton
Heliĝas tuj grandmaten'
//: Oe, oe.....en la ŝipo ://

Gravas ne la nuboj
Gravas ne la duboj
Kaj ne gravas ĉu la flor'
Estas ĉe ĉia buŝo
Aŭ en pafiltubo
Levita pugn' trafita kor'
//: Oe, oe.....en la ŝipo ://

Repreno de verso 1

Säg vackra skepp,
vems besättning är det som styr
Hur ser din flagga ut?
Om den är röd och svart
så ger vi oss iväg tillsammans
mot den vandrande horisonten.
//: Oe...oe.....på skeppet ://

Vårt skepps (otyglade) hop
från kust mot kust
drivna ju av vinden
befriar bröder
krossar galärskeppsödet
Genast dagas en grandios morgon.
//: Oe., oe.....på skeppet ://

Molnen betyder inget
Tvivlet betyder inget
och det betyder inget om en blomma
finns i varje mun
eller i en bösspipa
En höjd näve, ett träffat hjärta
//: Oe, oe.....på skeppet ://

*Repris av vers 1
/Siv "tradukis" en la svedan*

Bildoj el la lasta tago de la kurssemajno, 28 junio



La kursanoj kolektiĝis hejme ĉe Ingegerd kaj Lasse. Ingegerd preparis poentan promenon por ni. Fotis: Elvira.



Lasse plantas la **Esperanto-kverkon** en arbara herbejo proksime al la domo de Ingegerd kaj Lasse. Fotis: Andreas.



Nun ni havas nian propran Esperanto-kverkon en Svedio! Ingegerd kaj Christin tenas la flagon. Fotis: Elvira.



La kursanoj Peter kaj Daniel el la grupo de progresantoj. Fotis: Elvira.



Tosto por la Esperanto-kverko. Elvira (en flava bluzo) venis el Gdansko por ĉeesti la plantadon de la sveda Esperanto-kverko. En Pollando ili ja havas jam sian Eo-kverkon. Fotis: Andreas.



Lasse montris al interesitaj du sorĉkaldronojn (rondaj kavaĵoj en la roko faritaj de riverigo en la glacia epoko) aliflanke de la roko kiu videblas en la bildoj. Li krome rakontis ke la murforma flanko de la roko (videbla en la bildoj) iam konsistigis unu el la muroj de dometo. Fotis: Andreas.

Revenintaj en la ĝardenon de Ingegerd kaj Lasse ni estis regalitaj per rostaĵo super braĝo.



La bieneto de Ingegerd, Lasse kaj filino Christin estas plena de bestoj. Christin kun unu el siaj kunikloj. Peter kaptis la katon. Fotis: Elvira.



Lasse kun "klavviolono". Fotis: Elvira.

Tekstoj: Andreas.

Saluton kaj bondeziroj al la Gotenburga kverko

En Sopot la kverkon ni nomas, "jubilea kverko". Esperantistoj plantis la kverkon dufoje. La unua estis plantita dum gdanska UEA-kongreso en la jaro 1927. Estis grava solenaĵo, kiun partoprenis esperantistoj el la tuta mondo. Ĉiuj tre ĝojis, ke la kverko kreskos kaj pligrandiĝos, same kiel la monda esperantistaro. Neniu tiam antaŭvidis la terurajn jarojn de la milito kaj tion, ke por faŝistoj povos esti malamiko eĉ kverko kreskanta en arbaro. La kverko tamen estis simbolo de paco, de amikeco kaj ĝi same, kiel Esperanto, ne estis tolerata – do nokte en la 38a jaro oni fortranĉis la arbon kaj disbatis la memorŝtonon. Post la milito la esperantistaro iom post iom rekonstruadis la vunditan movadon. En la jaro 1959 en Varsovio okazis la UEA-kongreso, kaj Gdansko ricevis organizadon de la XV-a Junulara Kongreso de TEJO. Dum tiu ĉi esperantista

renkontiĝo estis plantita la nuna kverko. Estis tre solene – esperantistoj el 40 landoj alportis teron de siaj landoj por meti ĝin sub la novan kverkon.

Tiu kverko kreskas ĝis hodiaŭ. Triurba esperantistaro zorgas pri ĝi kaj gvidas tien ĉiujn novajn aŭ alvenintajn el la mondo esperantistojn. Kutime ni renkontiĝas ĉiujare la 3-an de majo ĉe la kverko por ordigi la lokon post vintro. Se vi plane aŭ hazarde vizitos iam Sopot – nepre vizitu ankaŭ nian kverkon.

Mi estas tre feliĉa, ke de nun nia kverko havos sian pli junan fraton en Gotenburgo. Havante tiajn najbarojn kiel familion Granat ĝi tutcerte iĝos la granda arbego, kiu atestos pri la potenco de amikeco kaj esperantistaro.

Elvira Twardowska



La inaŭguro en 1959.



La kverko en 2018.

Elvira vizitante en Gråbo.



Kvar leteroj de la somera kurso, junio 2019

La kursanoj skribante alprenis alian identecon:

Vlad Vostrova skribas el **Ukrainio**

Kara Inga,

Estas la Jaro 1990 kiam mi skribas ĉi tion¹ leteron al vi.

Nun estas stranga tempo en Ukrainio²

Ĉi tio¹ Jaro USSR perdis ses republikojn³ kaj baldaŭ Ukrainio² deiris ankaŭ.

Tiaj aferoj ĝojigas min ke mi loĝas en Lviv.

Aferoj estas pli trankvila⁴ tie ol Kiev.

Mi esperas, ke vi fartas bone.

Amike,

Vlad Vastrova

Några kommentarer:

Detta var mycket bra!

(1) *ĉi tiun; Ĉi tiu...*

när ett substantiv kommer direkt efter - leteron, jaro –så ska ti- sluta på u.

Står det självständigt utan substantiv, så slutar ti- på o

(2) *Jag lurade er första dagen – Landet heter **Ukrainio**.*

(3) *republikojn . Pupo betyder docka. Pudo är en rysk viktenhet= 16,38 kg*

(4) *aferoj estas pli trankvilaj*

Inga Johansson

Kara Inga,

Mi estas Siskari kaj mi venas de **Tajlando**. Mi

loĝas en Bangkok¹ la ĉefurbo en Tajlando.

Estas la multe² granda urbo en Tajlando

kaj multe trafikoj.³

La vetero estas bela sed multe³ varmego.

Korajn salutojn

Siskari

Bona kaj mallonga letero

(1) *Bankoko; Wikipedia tillåter även stavningen Bangkok.*

(2) *Estas la **plej** granda urbo = det är den största staden. Det finns större städer= Estar pli grandaj urboj*

(3) *kaj multe **da** trafiko ; sed multe **da** varmego*

Letero el **Niĝerio**¹

Saluton Inga!

Mia nomo estas Eze Okpara!

Mi laboras en Niĝerio.¹

Niĝerio estas Africas² popolo abunda la lando en la mondo.

La Englando³ estas officiella⁴ lingvo en Niĝerio.

Ni manĝas kaproviandon kaj bushmanĝon⁵ Ĝis!

Eze Okpara

Bona letero!

(1) *Det var jag som lurade er att skriva fel namn på landet den första dagen*

Niĝerio = Nigeria

Niĝer = Niger --- kolla på Wikipedia

(2) *Afriko - afrika popolo*

(3) *Angla - la angla lingvo*

(4) *oficiala – ingen dubbelstavning*

(5) *bush ? Vad äter man mer än getkött?*

Sekvapaĝe la letero el Irlando:

Saluton Inga:

Mi faris virtualan vojaĝon al Irlando
ĉar mi skribas el Dublino.

Nun mi pezas, kiam vi donis al mi
iujn nomojn de reprezentantoj de Irlando
kaj mi refuzis ĝis. Nun mi pentis.

Mi kredis ke Irlando nur estis futbalo
kaj biero. Kvankam li havas la plej bonan
bieron kaj viskion en la tuta mondo.

Mi ne nomas ĉiam la reprezentantojn de
la kulturo ĉar estas tre multaj.

Bel konata nomoj de la literaturo estas:
Oscar Wilde, Jonathan Swift, k.t.p.

Irlando havas kvar premiojn de literaturo
kaj unu de fiziko.

En la ekonomio, Irlando estas "la tigro Celta"
ĉar estas una de la plej disvolvitaj de la
mondo.

La naturo kaj pejzaĝoj de la Irlando
estas la plej bela.

Kun sincera saluto

Fco.

La fiera vaporŝipo "Ångaren Bohuslän"



La vaporŝipo "Bohuslän" estas unu el plej belaj kaj plej oldaj ŝipoj, kiuj surveturis la maron ekster Gotenburgo kaj laŭlonge de la okcidenta marbordo.

"Bohuslän" estis konstruita en "Eriksberg" en 1914 kaj veturis dum kvardek jaroj po ses tagoj semajne de Gotenburgo al "Kungshamn" kaj returne. Sur la mara vojo la

ŝipo haltis ĉe "Smögen, Lysekil kaj Marstrand".

Hodiaŭ eblas fari tiun ĉarman marvojaĝon al la juveloj en la provinco de Bohuslän... faru tion... Hoj la ŝipo!

(Sabate 29 junio Siv, Elvira kaj la familio Granat faris rondveturon sur la ŝipo al Marstrand kaj returne.)

Sädesärlan Blanka motacilo



Tzelitt, tzelitt... estas la blanka motacilo, kiu kantas kaj dancas sur la grundo antaŭ mi. Nun estas vere printempo. La birdo ĉasas insektojn, kiuj estas ĝia manĝo. La plumaro estas bela en nigra, griza kaj blanka koloroj.

La birdo estas gracia kaj havas longajn krurojn kaj longan voston.

Laŭ oldaj ideoj ne bonas se vi unue vidas la birdon frontrigarde. Tiam estos profunda malĝojo, sed se vi unue vidas la voston, estos ĝojo la tutan jaron. Superstiĉo aŭ ne? Mi ne scias, sed vidu la voston unue! /Ingegerd

”Arkta Ŝterno” kaj ”ridmevo” klarigas problemon



Arkta Ŝterno



Ridmevo

- Saluton sinjoro ”Arkta Ŝterno”!
- Mi salutas ankaŭ vin sinjorino Ridmevo, sed nomu min nur Allan, kiu estas mia ordinara nomo inter miaj amikoj.
- Jes, jes, sed mi mortas pro rido! Ĉu vi ne vidis en la lasta ”Ora Ĵurnalo”, numero 18, ke iu nomis vin per mia nomo? La tuta familio mevbirdoj ridis...
- Kiu aroganteco! Mi, la fiera kaj forta ”Arkta Ŝterno” Allan!
- Ĉu vi decidu ke mi estu la ridmevo kaj vi la ”Arkta Ŝterno”?
- Jes certe, ĉu estas la klubo en Gotenburgo kiu eldonas tiun gazeton?
- Jes certe, mi ankaŭ scias ke la klubo havas aliajn programojn, ekz. la ”Esperanta Sabato”

kiu estas tre amuza kaj lerniga, jes la klubo en Gotenburgo bonvenas ĉiujn...

- Jes, certe mi ankaŭ aŭdas pri kulturaj promenoj tra Gotenburgo dum la somero...
- Jes, mi volas partopreni en la promenoj tra Gotenburgo... estos vere interese...
- Kaj ne forgesu vidi en la retpaĝo! Tie la programo prezentiĝos kaj ne hezitu partopreni en la okazaĵoj...
- Mi certe volas partopreni en la okazaĵoj de la Gotenbarga klubo! Estas amuze!
- Jes vere... Kaj ne forgesu anonci vin al la someraj kursoj en junio, la 24an ĝis la 28a.
- Kompreneble! Ĝis revido!

/Ingegerd

Ingrid Vallin trovis la birdojn, kiuj ĉiuj svede finiĝas per *sångare* = kantisto



lövsångare – fitiso
gransångare – ĉifĉafo

grönsångare – arbarfiloskopo
ärtsångare – babilema silvio

Notu ke la nomo de la birdoj fitiso kaj ĉifĉafo imitas la sonojn de iliaj kantoj.

Aliaj sångare/kantistoj trovitaj en ”Svediaj Birdoj” de Malte Markheden:

bergsångare – montfiloskopo
videsångare – salikfiloskopo
fältsångare – kampa kanbirdo
rörsångare – kanbirdo

brunsångare – bruna filoskopo
busksångare – arbedkanbirdo
vassångare – kangrilbirdo
lundsångare – verda filoskopo

Sveda kanto: Gaja birdeto de H. Säterberg / Princo Gustaf

https://www.youtube.com/watch?v=4dkpvp_jWo8

Malte Markheden esperantigis la kanton.

Gaja birdet' en matena horo
freŝa printempo, salutas mi vin.
Vokas alaŭdo kaj turdo en ĥoro
sturno sur kampo kaj tetro sur pin'.
Jen kun la brila kolor' arĝent'
saltas torent', saltas torent'
Brakojn etendas al herboj kaj ŝtonoj.
Vibras arbuste printempaj ĝojsonoj
pro vivo kaj san'
en mirinda printempa sunban'.

*alaŭdo = lärka; turdo = trast
sturno = stare; tetro = orre*

Pri la sinjordomo Nääs. Revoj realiĝis sur la heredaĵo de Nääs.

Ĉe la strato kun la bizara nombro Stora Nygatan 17½ vivis pogradisto August Abrahamsson, kiu fondis la slojdseminarion ĉe Nääs. Lia edzino Euphrosyne estis operkantistino kaj faris grandan laboron en la muzika sceno en Gotenburgo.

Tiu fabela kantobirdo mortis nur 33-jara en 7 februaro 1869 je la adreso 17½, ĉe Stora Nygatan. Ŝi estas entombigita en la juda tombejo ĉe Svingeln.

Tiel komenciĝas la mirinda historio pri Nääs kaj daŭre oni rakontas ĝin, jaron post jaro.



Nääs kaj Otto Salomon

Otto Aron Salomon, (1849 – 1907) estis sveda didakta pedagogo, kiu evoluigis la svedan lernejan slojdon. Li estis nevo de Aŭgust Abrahamsson, kiu fondis la kursan agadon de Nääs. Unue Abrahamsson estis la estro sed baldaŭ li translasis la taskon al Otto Salomon. De 1872 evoluiĝis slojdseminario, kiu fariĝis fama ankaŭ eksterlande. Otto Salomon korespondis kun preskaŭ la tuta mondo. La kursanoj de Nääs ofte estis invititaj instrui pri slojdo en multaj landoj. Salomon skribis librojn pri siaj ideoj pri slojdinstruado.

La fratino de Otto nomiĝis Sophie Elkan, plej konata pro sia amikeco kun Selma Lagerlöf. Sed Sophie ankaŭ mem verkis (ekz. libron pri John Hall kaj Gunnebo-palaco). Post ke ŝia edzo kaj infanoj mortis dum vojaĝo en Italio, Sophie translokiĝis al Nääs por helpi al sia frato. Ŝi skribis multe pri Nääs. En sia libro "Längtan till Österlandet" (Sopiro al la Oriento), ŝi rakontas pri egipto, Said ben Ali, kiu post trijara studado pri la angla en Anglio volis hejmeniri. Sed la Edukadaj Aŭtoritatoj en Kairo volis ke li unue iru al Nääs por lerni slojdon. Li venis per ŝipo al Gotenburgo kaj

trajno al Floda, kaj poste li planis iri per la vaporboato ĝis Nääs. Tamen kelkaj junularaj kursanoj pensis ke estus pli bonvenige se ili venigus lin per la granda remboato. Kvar junulinoj remis kaj du anglaj instruistoj kunestis. Said ben Ali ŝajnis timigita rigardante la junulinojn kun blondaj

harplektaĵoj. Ne, li ne volis iri kun ili! Anglo klarigis ke okejas. Rigardante la egiptan flagon en la boato Ali tamen akceptis la veturilon. Plej gravis por Said ben Ali ricevi diplomon de Nääs. Poste li pro la diplomo ekhavis postenon en la universitato de Kairo – kiel instruisto pri gimnastiko.



Nääs en junio 2019. Sur la bildo franca paro – Gabriel Lacroix vizitis la E-klubon de Gotenburgo kelkfoje.



OTTO SALOMON

Iomete pri alia eksterlanda partoprenanto: Basil Popoff el Bulgario



La slojdseminario de Nääs.

Basil estis sendita de Bulgario al Nääs. Li ne regis aliajn lingvojn kaj ekhavis problemojn. En Germanio li aĉetis malbonan mapon, sed li trovis la nomon Nissa, kiun li pensis samas al Nääs. Sed Nissan ja estas unu el la kvar riveroj en Halando. Li ekloĝis en hotelo en Halmstad. Neniu komprenis lian lingvon. Krimulo estis publike serĉata kaj oni pensis ke estas la bulgaro. La polico venis, rigardis lian pasporton kaj tie ili legis ke li estas instruisto. Ankaŭ troviĝis paperpeco kun la nomo Salomon. Tiam oni komprenis, venigis lin al la trajno por Gotenburgo – kaj li atingis Nääs. /Siv

Hinda lernanto en la slojdseminario de Nääs



Al la slojdaj kursoj venis partoprenantoj el la tuta mondo. Kelkaj nur sciis sian gepatran lingvon. Ili ofte loĝis en domo nomita Babel. Ĝi situis inter Lekhuset (domo por ludoj) kaj la lago.

Estis multaj kulturaj kolizioj, ekzemple por sinjoro Lakshmiswar Sinha el Hindujo (1905 – 1977, lernanto kaj kunhelpanto de Tagore), kiu venis al Nääs en 1929. Ĉe lia tablo en la manĝejo sidis nur virinoj kaj estis la unuan fojon kiam li sidis ĉe la sama tablo kiel virinoj. Sed li al kutimiĝis.

Li partoprenis en la someraj kursoj kaj aŭtune li informis la direktoron ke li volas lerni virinan slojdon por poste instrui al virinoj en Hindujo.

La direktoro neis kaj proponis la metalan kurson. Ne estis kutimo ke viroj partoprenis virinan slojdkurson. Sed – tiam ĉiuj kursanoj marŝis en procesio al la direktoro Holm petante ke Sinha povu lerni virinan slojdon. La direktoro akceptis. Li diris: – Nu, sinjoro Sinha, vi ja fariĝis la heroo de la virinaj

kursanoj.

Eta epizodo pri Sinha: Dum la ŝipveturo al Gotenburgo lia horloĝo rompiĝis. La unuan nokton en Nääs la suno vekis lin kaj li iris al la manĝejo Vänhem por matenmanĝi. Ĉiuj pordoj estis fermitaj, sed la mastrino aŭdis lin kaj klarigis ke estas la dua nokte.

Poste Sinha skribis pri sia restado en Svedio en esperanto. En 1936 li publikigis sian libron: "Hindo rigardas Svedlandon".

La suda alo de Nääs



Mi promenas sub la grandaj arboj de la sinjordoma parko de Nääs. Estas malvarmete.

La grandaj, folikovritaj arbokronoj ofertas ombbron. La forta julia suno tralikiĝas per la

foliaĵo, donante ĝustamezure da lumo.

Antaŭe sur la pado mi vidas en la ŝanĝantaj ombroj du mallumajn figurojn. Mi vidas, ke estas du malhele vestitaj plenkreskulinoj. Ili portas ĝispiedajn jupojn kaj grandajn ĉapelojn. Unu el la virinoj havas sunombrelon enmane.

Lante ili promenas brakon en brako laŭ la pado malsupre de la granda blanka palaco. La vento blovas kontraŭ mi, kie mi malrapide sekvadas la du virinojn. Mi rapidigas miajn paŝojn. Mi ege sopiras aŭdi, kion ili diras. Subite mi perceptas fragmentojn de la konversacio. Ŝajne ili paroladas pri inspirado...

”Ne ĉiam estas facile kolekti la pensojn. Por mi ĉiam malfacilas, kiam estas sunplena somertago. Ja estas tiom da allogoj eksterdome”, mi aŭdas unu el ili diri.

”Eble pliboniĝos ĉi-posttagmeze, kiam estos iom malvarmiĝinta”, respondas la alia.
”Supozeble estas nur la forta varmo, kiu erarigis niajn pensojn.”

”Ni senkulpigu nian pigrecon per tio, ke la somero tro gravas, por ke oni sidu ene en la studa ĉambro skribadante. Eĉ ricevintino de nobelpremio rajtu ĝui la someron!”

”Cetere, ĉu vi atentis la virojn kaj virinojn, kiuj laboradis en la ĝardeno antaŭ la palaco, kiam ni preterpasis?”

”Jes, certe! Kia hasto! Ĉu vi vidis, kiom da vestaĵoj ili portis? Nepre varmegiĝas...”

”Mi pleje rigardis la sinjorinon, kiu stiris la novan aĵon, kiu tondas la gazonon. Ŝajnas al mi, pripensante, ke ankaŭ ŝi portis multe da vestaĵoj meze en la suno...”

”Ili ankaŭ sarkadis la bedojn. Mi vere esperas, ke ili prizorgas la ĝardenon ĉe Mårbacka, tiel ke la plantoj ne tute kunkresku...”

”Tamen ĉi tie en la sinjorino ili certe pripensas, kio konvenas. Ili ja neniam scias, kiu faros viziton. Tie ĉi oni miksas ’ciun ajn’ kun reĝaj personoj – ni ja vidis!”

”Ĉu ni pluiru kontraŭ la vaporŝipa albordiĝejo ĉe la ponto?”

”Ĉu ne fariĝos tro varme, laŭ vi?”

”Ne, kutime ventas fortete de la lago. Estos bela promeno, ĝis kiam ni revenos al nia alo.”

”Jes, vi tute pravas. La plumo anstataŭe atendadas sur la skribtablo. Eble la inspiro pliboniĝos per tiu ĉi longa promeno.”

”Jes, prave!”

Kiam la du sinjorinoj eliras sur la ponton, mi vidas, kiel ili forviŝiĝas, la konturoj malaperas, la malhelaj vestoj ĉiam pli heliĝas. Mi ne plu aŭdas, pri kio ili parolas. Ili estas for!

/Ingegerd



Kuriozaĵo pri Nääs



La palaco de Nääs havas 23 ĉambrojn kaj kuirejojn dividite en tri apartamentojn. Mi rekomendas viziton. Estos montroj kun gvidanto ĉiun tagon dum la somero. Oni ne rajtas tuŝi ion en la palaco kaj oni ankaŭ ne povas uzi la meblojn. Troviĝas skabeloj kiujn oni povas prunti.

1979 – filmfaro



Charlotte Löwensköld, reĝisorado: Jackie Söderman.

Estas la libro de Selma Lagerlöf pri Charlotte Löwensköld kaj Anna Svärd kiu estis filmigita kun vere grandaj, svedaj aktoroj. Arja Saijonmaa ludis la rolon de Anna Svärd. Ŝi volis iri per duonkaleŝo tirata de du tirĉevaloj, Zemon kaj Optima. Tri koleraj inoj kaj prudenta veturigisto veturis tien–reen sur la ponto ĉe Nääs por fari unu minuton de la filmo. Mi estis tie, Optima (maldekstre) estis mia ĉevalo.



Aktuale en 2019

”Nia tempo estas nun” la epopea, televida serio, kiu temas pri la vivo de familio ekde la komenco de 1945, estis parte filmita tie. La

ĉefrolulo Helga Löwander havis sian apartamenton ĉi tie en la filmo.




Vänhem tiame kaj nuntempe



Vänhem tiame...

En Augusto 1891 la reĝo Oscar II kun la princoj Gustaf kaj Eugen vizitis Nääs. Björkenääs, la iama loĝejo por la estro de la slojdseminario, Otto, estis ornamita por la granda festo kaj nova necesejo estis konstruita en la palaco. Oni pensis ke la reĝa familio ne povis viziti eksterdoman fekejon kiel ordinaraj homoj.



Vänhem nuntempe...



La homoj en Nääs



La bildo montras la parencaron ĉe Nääs ĉirkaŭ 1890:

Maldekstre la juna filo de Otto Salomon, Otto II, Otto Salomon mem, Henriette Salomon la patrino de Otto kaj fratino de August Abrahamson, kiu sidas plej dekstre.

Starantaj: Sophie Elkan, fratino de Otto, poste la pli maljuna filo de Otto, Axel, Ellen, la edzino de Otto, N. Wahren, kaj la juna fratino de Otto, Elise kaj ŝia filo. Elise estis unue edziniĝinta kun la nomo Sköldebrand kaj poste Wrangel.

La luddomo – Lekhuset



Somere "Nääsamfundet" invitas al kursoj pri diversaj temoj.

Ekzemple estas danckurso por prepari sin por la danco ĉirkaŭ la somermeza stango.

Tiam diversaĝaj homoj lernas la oldajn popolajn dancludojn en la luddomo aŭ sur la grandaj herbejoj ekstere.

/Ingegerd

Mi volus doni al vi florojn por la somermezo!

Estas bukedo de:



Ranunkoloj, lekantoj, lupinoj, cejanoj, urtikokloŝoj, viskoliknidoj, delfinioj, ternakileoj, akileo milfolia, arbara geranio kaj senodora kamileo.

Estas multkolora bukedo kun diversaj floroj, kaj ĉiuj estas same belaj...

Ranunkolo – smörblomma;

Lekanto – prästkrage;

Lupino – lupin;

Cejano – blåklint;

Urtika kloŝo – nässelklocka;

Viska liknido – tjärblomster;

Delfinio – riddarsporre;

Ternakileo – nysört;

Akileo milfolia – rölleka;

Arbara geranio – midsommarblomster;

Kamileo – baldersbrå

/Ingegerd

Ĉiun somermezon estas grandioza festeno sur **Nääs**. Matene la antaŭvesperon de Sankta Johano infanoj plukas florojn kaj faras florkronojn por la somermeza stango.

Posttagmeze fortaj viroj starigas ĝin. Sekvas dancoj kaj ludoj kaj meznokte oni dancas kun torĉoj en la manoj. /Siv



Labortagoj en Varberg

Por havi inspiron labori por Ora Ĵurnalo, Ingegerd kaj mi trajnveturis al Varberg, urbo sude de Gotenburgo. Oni nur bezonas 45 minutojn por la vojaĝo inter Gotenburgo kaj Varberg.


Kompreneble ni tranoktis en ĉeloj de la malnova kastelo, multe pli komfortaj ol la iamaj prizonĉeloj, sed la (mal)grandeco samas. La promesitaj fantomoj malaperis vidante niajn komputilojn kaj poŝtelefonojn.



Gotenbarga skribogrupo ankaŭ loĝis en la prizonejo.

Ambaŭ tagojn ni promenis en la urbo. Mi aparte admiris la statuojn. /Siv

Ĝuu:



Ruĝa muzeo, flava malliberejo, banejo en Varberg



La gvidataj rondiroj en la muzeo komenciĝas nur en julio. Tamen estis interese mem vagi.

Ĉar ni estis lacaj ni sidiĝis por vidi filmon pri la kuraca vivo en Varberg. Reĝaj vizitoj originis la lokon.

La marborda sanatorio Apelviken estis fondita en 1904 de la kuracisto Johan Severin Almer. Li certigis, ke la mara klimato estas saniga por infanoj kun tuberkolozo. Pli konata estas la malnova banejo sube sur la bildo.



La krokodiloj estas pli novaj. (Konstruitaj de esperantisto???)

Sur la bildoj: Ingegerd survoje al la banejo. En la fono la kastelo. Nia loĝejo vidata de la deklivoj survoje al la muzeo.



”Bockstensmannen”

Ne ŝajne helpis enbati du palisojn tra la mortinta viro, kiu troviĝis en torfejo en Halando, ”Bockstensmosse”. Sciencistoj taksas ke li mortis iam inter 1350 kaj 1370. Tiu farado estis kutimo por malhelpi al la mortinto reaperi.

Nun, en la 21:a jarcento, li venas sur



Det tycks inte ha hjälpt att driva pålar genom mannen som mördades på bockstensmosse någon gång mellan 1350 och 1370. Detta var en sedvänja man hade för att förhindra den döde att gå igen. Nu i det 21:a århundradet kommer han dock marscherande på bron ut till Varbergs

Episkopo en la dekkvara jarcento – La hodiaŭa viro.

la ponto de la kastelo en Varberg. Li ŝajne estas vestita same moderne hodiaŭ kiel li estis tiam, en la lasta modo kiu regis tiam. Hodiaŭ validas komforta stilo.

Oni spekulativas ke li estis nobla viro kiu faris iradon sur la torfejo.

En la kastela muzeo ni povas vidi la restaĵon de "Bockstensmannen" en vitra kesto. Pupo montras la aspekton de tiama persono kun tiamaj vestoj.

Sed, kiu estas la viro sur la ponto?

/Ingegerd

Fästningsområde.

Han tycks vara lika modernt klädd idag, som han var då, i det senaste modet som gällde för tiden. I dag gäller dock en betydligt ledigare stil.

Spekulationerna säger att det var en förnäm man som var på vandring över mossen. På Varbergs museum kan man se Bockstensmannens livsrester i en glaslåda och en docka är också framtagen med tidstypiska kläder.

Men, mannen på fästningsbron, vem var han?


Ŝajne la ŝanĝo de laborloko vigligis Ingegerd kaj min!



Jen Ingegerd en la herbejo plej supre kun la urbo en la fono kaj dekstre mi en strato kun rozoj.

Vespera interparolo kun Kajsa kaj Inger de skriba grupo... kaj trankvila promeno ĉirkaŭ la kastelo ĉe la maro.

/Siv



Charlie Chaplin instruas Esperanton

El la retejo de Gresillon:

Kara Esperantistoj, Karaj Aktivuloj,

Jen priskriboj de novaj kursoj prezentotaj de mi por spertaj Esperantistoj, amikoj de UNESKO, kursgvidantoj kaj aktivuloj en la Esperanto-Movado – antaŭ kaj post la Universala Kongreso – en la bela, alloga, unika Kastelo de Grésillon en Francio. Mi esperas, ke vi ŝatos ĝuste tiajn kurso-enhavojn, kiujn mi plene priskribas en pluraj artikoloj en la revuo Esperanto, kaj en la fakĵurnalo IPR, Internacia Pedagogia Revuo de ILEI. Ĉi tiuj kursoj estos prezentitaj ne nur por lerni la enhavon de la materialo, sed ankaŭ por lerni kiel uzi ilin poste en VIAJ lokaj kluboj, lokaj asocioj de Esperanto. Tio estas, vi lernos kiel lernanto, kaj vi lernis ankaŭ kiel iĝi kursgvidanto, se vi volas, de tia materialo. Jen sube iom da informo pri la antaŭ- kaj postkongresaj kursoj en la Kastelo de Grésillon.

1 UNESKO-Kuriero, Pensiga Kurso.

Legi, Kompreni, Prezenti, Interdiskuti.

Unu el la ĉefaj atingoj de la Esperanto-Movadoj en la lasta jardeko estas la eldonado de revuo de UNESKO en Esperanto. Sed kiel ni povas utiligi nun UNESKO-Kurieron en la klasĉambro, en niaj lokaj grupoj, por plenkreskuloj? En Somero antaŭ la Universala Kongreso en Finnlando, inter la 6a kaj la 18a de julio, en la bela Kastelo de Grésillon, ni esploros ĝuste tiun temon, kun la espero, ke vi mem povos poste starigi tian kurson en via loka klubo, aŭ utiligi la enhavon de UNESKO-Kuriero, esperante kaj nacilingve, por

antaŭenigi la celojn de Esperanto kaj de UNESKO en via urbo, en via lando. Artikoloj en la revuo de Esperanto

(Februaro, 2018), kaj la ĉefartikolo de la Internacia Pedagogia Revuo de ILEI (2019–1) parolas pri le kurso gvidata de Dennis Keefe kaj en Azio kaj en Eŭropo. Iru al la retejo de la Kastelo: gresillon.org/s2

2 Charlie Chaplin, Pensiga Kurso.

Mi vid(ig)is, Mi rid(ig)is, Mi pens(ig)is, Mi lern(ig)is.

Inter la jaroj 1915 kaj 1936, la fama filmisto Charlie Chaplin, Ĉoĉo, kreis dekojn da altkvalitaj filmoj, kiuj estas surprize kaj mirinde efikaj por paroligi gelernantojn en niaj kursoj por komencantoj, komencintoj kaj eĉ por spertaj Esperantistoj. Estas iom paradokse, ke senparolaj filmoj kreas tiom da emoj paroli (multe pli ol teksto kaj bildoj) en esperantaj kursoj, Kial? Parte ĉar la ideoj sen vortoj devas klare prezentiĝi surekrane, kaj parte ĉar Chaplin estas geniulo pri homa esprimado kiu mense kaj kore tuŝas nin. Faka artikolo pri ĉi tia kurso troviĝas en IPR, Internacia Pedagogia Revuo (2017–4). La kurso disvolviĝos en aŭgusto, inter la 6a kaj la 18a, post la Universala Kongreso en Finnlando. La plej rigida, sed serioza, kurso de Dennis Keefe. Iru al la retejo de la Kastelo: gresillon.org/s4



Roger Nilsson trovis svedajn strangajojn



www.shutterstock.com · 1228654316

Juristen:

Skepp kallas en fast flytande del av en stats vandrande territorium.

Geografen:

Med en urskog förstås en skog, där ingen människas hand någonsin satt sin fot.

Biologen:

Ugglan är en fågel som endast nattetid visar sig i dagsljuset.

Fysikern:

När jag på långt avstånd avskjuter en kanon mot en man, så ser han först elden, sedan blir hans huvud avslitet och först när han är död hör han knallen.

Astronomen:

Kastor och Pollux är två stjärnor som utmärker sig därigenom att avståndet från Kastor till Pollux är precis lika stort som från Pollux till Castor.



Kulturhistorikern:

I Kina kunde en dödsdömd man betala en annan för att han skulle ta straffet istället.

Det fanns många fattiga människor som levde med att ha detta jobb som ställföreträdare.

Kemisten:



Det ämne ni ser i denna flaska är det dödligaste av alla gifter. En liten droppe på tungan av en katt är nog för att döda den starkaste karl.

Läkaren:

Mot denna sjukdom känner vetenskapen bara två botemedel, och inget av dem hjälper.



Läraren:

Elevernas kunskap är så dålig att trots att alla vet att två gånger två är fyra, kan ingen förklara varför.

Konstkännaren:

När man bedömer ett konstverks äkthet måste man ta hänsyn till två saker: Antingen är bilden falsk och namnteckningen äkta eller om bilden är äkta är namnteckningen falsk.

Pli el la somera kurso

En la konversacia grupo unu tasko estis traduki amuzajn historietojn esperanten. Jen kelkaj rezultoj de tio:

La patro sekvas etan Peĉjon al la lernejo por la unua fojo:

Vi devas iri en la lernejo nur ĝis vi havos 16 jarojn.

Peĉjo komencas plori kaj demandas:
Sed tiam vi ja venos por preni min hejmen?



Nun vi devas iri al la lernejo Niĉjo.

Mi ne volas, ĉar ĉiuj estas tiel malicaj al mi tie.

Iru nun, vi tamen estas la rektoro.

Ekskursoj proksime al Gotenburgo

Ingegerd donas proponojn – ĉefe pri maraj ekskursoj. Vidu sube kaj paĝojn 28 kaj 44!

El la malnova kantolibro "Vivu la stel' " mi (Siv) trovis la jenan kanton pri la maro.

Melodio: <https://www.youtube.com/watch?v=jAdSwGwgaKk>

Blovas vent' ("Vinden drar, skeppet far" – Sveda popolkanto el Finnlando)

Blovas vent', post moment'
iros ŝip al mar'.
Ekĝemas amikino de l' marist',
malĝojas la ondar'.
Ploru ne, etulin', viŝu larmojn
for.
ĉar mi revenos post mallonga
temp'



kun ĝojo en la kor'
Or' kaj arĝent' el orient'
estos donac' de mi.
Velur' kaj silko estas en la
kest'.
kaj ĉion havos vi.

E. Malmgren

"Vinga"

– en utkant av Göteborg.



Ĉu mi okupos la flugilojn de la matenruĝo

Ĉu mi loĝiĝos sur la rando de la maro:

Ankaŭ tie Via mano min kondukos,

Kaj Via dekstra mano min tenos.

El la psalmaro 139: 9–10. Se vi volus fari
aventuran vojaĝon, Vinga estas tre interesa
insulo ĉe la rando de la maro ekster
Gotenburgo. Tie troviĝas gvidantoj, kiuj povas

konduki vin al la lumturo kaj rakonti la
historion de Vinga. La vetero estas tre grava.
La maro povas esti terura. Bonan vojaĝon!
/Ingegerd

Tjolöholm

– grandioza palaco ĉe la marbordo de Halando.




Proksime de Gotenburgo situas la bela palaco "Tjolöholm".

Tie ofte estas loko por ĉevalkonkursoj, aŭtoekspozicioj kaj aliaj interesaj okazaĵoj.

Ĉe la palaco estas ebleco bani sin en la maro. Estas afabla sablostrando. Vi povas trinki kafon en la kafejo kaj promeni en la parko.

Je precizaj horoj gvidanto montras la palacon kaj rakontas pri ĝia historio.

Tips från Inga Johansson



Under sommaren har radioföljetongen i P1 varit Doktor Glas av Hjalmar Söderberg. Den går fortfarande att lyssna på till början av augusti via länken: <https://sverigesradio.se/avsnitt/1298709>

Passa på att då köpa Sten Johanssons översättning till esperanto av boken från vår bokshop: <http://www.esperanto-gbg.org/> > bokshop. Priset är bara 40 kr.

La malnova ringo

de Ingegerd Granat

ESTAS somertago kaj mi sidas sur la tre komforta ripoza seĝo en la ĝardeno.

La suno brilas el la helblua ĉielo. Mia ĵurnalo kun la tro malfacila krucvortenigmo kuŝas sur la gazono.

Mi ekloĝis en la forlasita bieno antaŭ du semajnoj. Ĝi situas en la Smolanda arbaro ekster Eksjö. Mi intencas skribi krimromanon pri la mezo de la dekseca jarcento. Mi pensas ke

mia historia rakonto pri la homoj en la tiama tempo donos al mi multe da mono kaj grandan laŭdadon en la estonteco.

La forlasita domo estas malmoderna sen telefono kaj mi estas tute sola kun miaj libroj. Antaŭ unu jaro mi malsaniĝis kaj nun ne funkcias kiel ĵurnalisto. Mi "iris en la muron" kaj nun mi prenas la tagojn laŭmezure.

La malnova aŭtaĉo estas blua – kaj rustkolora. Ĝi havas dudek kvar jarojn kaj ofte ne startas. Estas tre bone restadi meze en la profunda arbaro sen telefono kaj komputilo. Mi nur aŭdas la birdojn kiuj kantas kaj mi vidas la ĉielon. Eksjö situas tridek kilometrojn de tie ĉi. Mi faras aĉetojn po unu fojon semajne, se mia aŭto startas.

2

Ĉio komenciĝis la pasintan printempon, kiam mi vizitis Stokholmon por skribi artikolon por "Dagens Nyheter" pri la muzeo "Livrustkammaren", kiu situas en la Reĝpalaco.



Mi vere interesiĝas pri juvelaĵoj kaj mi volas skribi speciale pri la ringoj, kiuj havas interesan historion.

Mi aŭskultis dokumentan programon, kiun Radio P1 dissendis.

Temis pri tre malnovaj ringoj, kolieroj kaj braceletoj. Kelkaj estis portitaj dum revolucioj, kronadoj kaj geedziĝfestoj. Kelkaj alportis sanon, kaj aliaj malfeliĉon. Ĉiuj estis vere malnovaj.

Mia artikolo vere estis sukcesa kaj estis publikigita en "DN" dimanĉe en majo. Sed post la artikolo, mi sentas min persekutita. Estas la princino el Prusio, reĝino Lovisa Ulrika, kiu aperas en miaj pensoj kaj interrompas min.

Ŝian edzon oni nomas "la nomostampilo" kaj li manĝis fastobulkojn kaj mortis – la reĝo Adolf Fredrik.

Mi aŭdas voĉojn, jes mi vere aŭdas voĉojn. Kelkfoje mi ankaŭ vidis la grandan kaj noblan reĝinon.

3

– Kia terura malordo kaj vi ankoraŭ ne ellitiĝis!

La altstatura virino staras sur la planko kaj spektas la liton de la ĵurnalisto.

– Ĉu vi scias kiu mi estas? – Mi ne pensas ke vi scias! Kampulaĉo vi estas!

– Leviĝu! Tio estas ordono! Nu, leviĝu kaj vestiĝu!

Mi aŭdas ke la ĝispiedaj jupoj susuras kiam ŝi kuras ĉirkaŭe en la ĉambro.

Ŝi aperas tre indulgema! Ŝi ŝajnas aspekti same kiel la bildo sur la malnova ringo. Ĉu ŝi estas la reĝino Lovisa Ulrika, kiu estas la patrino de Gustaf III kaj liaj gefratoj?

– *Badin, Badin mia nigrulo, venu! Veku la bubaĉon!*

Mi vidas de mia lito kiel la nigra ulo eksaltas el la muro kaj faras rulojn ĝis mia lito. Li ekkaptas mian kovrotukon kaj svingas ĝin alte kontraŭ la plafono.

Poste li ekpinĉas mian nazon kaj ekprenas la kusenon kaj ekfrapegas mian kapon kaj kuras, jen per la piedoj, jen per la manoj, rekte en la muron.

– *Badin, Badin, haltu! Vi mizera sentaŭgulo! Atendu min!*

Mi vidas kiel la reĝino stumblas sur la ĝispiedaj susuraj juvoj rekte en la muron.

Mi estas sola kaj maldorma. Mia kovrotuko pendas sur la leglampo ĉe la lito kaj la kuseno kuŝas sur la planko.

La muro estas homplena!

4

Post malagrabra mateno mi matenmanĝas. Estas nur kaĉo el aveno kaj teo kiu staras sur mia tablo. Mi devas fari aĉetojn hodiaŭ.

Mi vere esperas ke mia aŭtaĉo startos.

Plej bone tuj iri!

Irante al mia aŭto mi vidas la dorson de viro kiu tenas floron inter siaj fingroj. Estas lekanto, mi vidas. Nun li aŭdas min kaj turnas sin al mi.

– *Mi estas Linné, vojaĝanto en Smolando. Mi volas renkonti reĝinon Lovisa Ulrika kaj ŝian nigrulon Badin hodiaŭ.*

– *Ĉu vi hazarde ilin vidis? Ŝi mendis naturaĵojn de mi.*

– *Cetere, ĉu vi volas esti mia lernanto? – Mi bezonas kiel eble plej baldaŭ lernanton por vojaĝo al Madagaskaro. – Ĉu vi interesiĝas pri tio?*

Subite mi aŭdis akran voĉon malantaŭ mi.

– *Neniam en mia vivo! Li estas malkapabla, vere malkapabla kaj tute frenezeta!*

– *Mia reĝino, estas por mi granda gloro!*

Mi vidas ke Linné riverencas antaŭ la reĝino.

– *Mi pensas ke Madagaskaro estas tre danĝera kaj riska. Mi ne volas sendi iun, kiu estas tre valora.*

– *Vi estas cinika! Mi bezonas tiun ĵurnaliston por skribi pri mia revolucio!*

– *Sendu iun alian!*

Mi staras meze sur la florherbejo kaj nur vidas lekantojn, kampanulojn, cejanojn kaj ranunkolojn. Neniu Linné, neniu Lovisa Ulrika, neniu Badin.

Kiam mi startigas la aŭtaĉon ĝi startas!

5

En la vendejo estas varme kaj troviĝas multe da klientoj.

Malgraŭ tio, mi aĉetis ĉion. Mi kontrolmarkis mian liston,

- lakto
- butero
- terpomo
- tomato kaj kukumo
- fromaĝo
- pano, mola kaj malmola
- viando
- surpanaĵo
- kafo
- fumaĵita skombro
- farĉita viando.

Ĉu mankas io por mia kafopaŭzo?

Mi iras al la kukaĵa vendotablo.

Fragotorteton mi volas!

Malantaŭ la vendotablo staras stranga viro. Li havas blankan perukon kaj pudron sur la vizaĝo.

8

Mi vekigis malfrue en la posttagmezo. La komputilo estis tute nigra.

La elektra fluo malaperis kaj mi estis sen lumo, sen akvo, sen varmo.

Estis malvarme kaj malsekete en la ĉambro. Mi fartis aĉe.

Ekstere mi aŭdis mallaŭtan zumadon. La sono venis el la laborejo en la kromdomo. Mi vidis kandelan lumon de la rungita fenestro.

Kio estis tio? Mi ŝteliris eksteren kaj kontrolis.

*– Envenu, envenu! Rigardu miajn
snuftabakujojn! Ĉu vi snufas?
Mi volas doni snuftabakujon al vi kiun mi
faris per la tornilo. Bonvolu!
Estas granda bonŝanco ke mi havas tian
slojdintereson.
Mia edzino riproĉis min, ŝi riproĉis Gustaf, ŝi
riproĉis lian edzinon Sofia Magdalena, ŝi
riproĉis la skribeman Hedvig Charlotta kaj
ĉiun homon ene de dek centimetroj! Precipe
Gustaf!
Prenu fastobulko! Bonvolu!
Lovisa Ulrika estas vergeto sur mia dorso! Fi
kaj fi denove!
Mi faris multe da snuftabakujoj!
Mi manĝis multe da fastebulkoj!*

La viro premis bulkon post bulko en la buŝon. Li kreskis kaj kreskis.

Mi vidis kiel li disfalis en la malhela laborejo. Mi vidis nenion kaj revenis en la domon. Kion mi vidis? Kiu li estis? Miaj pensoj estis multaj kaj malfacilaj.

9

Baldaŭ estos mia tempo en Eksjö finita. Mi nur lupagis por kvin monatoj. Septembro estos la lasta. Mi devas rapidigi mian historioskribadon.

La lastajn tagojn mi skribis tre furioze. Mi nek manĝis nek trinkis, nek dormis nek laboris, mi nur skribis...

Stako da malpura lavado staras sur la lavtablo. La lito estas ne aranĝita sed "kiel oni sternas, tiel oni dormas". Mia ununura ambicio estas fini mian libron. Mi skribas... mi aŭdas grandan krakon el mia vivĉambro. Ĉu la granda seĝo falis? Mi tuj rigardu! Mi malfermas la pordon kaj kion mi vidas? Viro kun longa, granda hararo sidas sur la granda tablo kun multe da silkoŝtofo ĉirkaŭe. Blua ŝtofo, verda ŝtofo, blanka, ruĝa, nigra, flava kaj siringviola. La ŝtofoj estas intermikse ĉiuloke en la ĉambro.

*– Permesu ke mi prezentu min mem! Mi estas la tajloro de reĝino Kristina kaj mi scias ke estos somerofesto ĉi tie morgaŭ kaj la tuta reĝa establita socio kun ĝiaj amikoj estas invititaj. Pardonu min! Mi ne prezentis min! Mia nomo estas Johan Leijoncrona kaj mi estas nobeligita!
La aliaj nobeloj estiĝis tre insultitaj. "Iras kun tondilo" ili diris! Ho!
Reĝino Kristina, ŝi estas mia reĝino! Lovisa Ulrika, ha ha ha... tiu dinastio estas nur amuzistaro! Plej bone ke mi rapidu kudri ĉies kompletojn kaj robojn! Mi baldaŭ devas esti preta! Bonvolu, ne ĝeni min!
Morgaŭ estos la granda festo!*

Mi vidas ke la tajloro kudras dum la mallumo falas. Fine estas nur nigraj ombroj kiuj dancas. Mi estas konsternita! Morgaŭ, somera festo? La tuta dinastio?

10

Punkto, mi estas preta! Fino bona, ĉio bona! Mi kuras kaj malfermas la pordon de mia vitroverando kaj eliras al la ŝtuparo. Tie mi restis staranta!

La tuta herbejo estas plena je multkoloraj homoj. Mi renkontas ĉiujn. Temas pri la personoj de mia revoj aŭ de miaj aperaĵoj. Mi estas tute surprizita!

– *Bonvenon al nia somera festo, diras Adolf Fredrik kun fastobulko en la mano.*

– *Silentu! Sinjoro Bellman kun siaj amikoj volas kanti! Silentu!*

Mi vidas ke la reĝino iras ĉirkaŭe kaj moderigas ĉies interparolojn.

Subite mi vidas Bellman sidante sur la granda ŝtono en la mezo de la herbejo kun sia liuto. Kaj li kantas:

– *La suno brilas polurita..., Neniam Irido sur jenaj palaj herbejoj..., Blovu nun ĉiuj..., Leviĝu Amarilido..., Flirtas Haga papilio...*

Subite, Bellman vokas:

– *Mollberg, Mollberg kiel vi fartas? Neniu dancas?*

– *Zorgu, ke tio estos farita! Vi estas la instruisto, ĉu ne!*

Sed mi vidas ke Mollberg kuŝas ĉe botelo malplena. Li dormas kaj ronkas.

– *Kioma horo estas, mi ne havas horloĝon, estas katastrofo! Mi, Fredman la granda horloĝfaristo, sen horloĝo.*

– *Vi estas malzorgemulo! Venu, venu miaj infanoj, Gustaf, Karl, Fredrik Adolf, Sofia Albertina kaj Badin, kie li estas? Venu tuj! Vi devas saluti la famulon kaj liajn lernantojn! Instruisto Linnæus estas tie! Venu tuj!*

Reĝino Lovisa serĉas siajn infanojn ĉie sur la herbejo.

Bellman kantas ankoraŭ.

– *Venu manĝi! Estas bona cervo-rostaĵo kaj ŝaŭmanta vino, vokas Movitz.*

Subite mi sentas ke iu frapas min sur mia ŝultro.

– *Ĉu vi ne pensas ke mi kudris bonan vestaĵon?*

Estas la tajloro Leijoncrona kiu estas tre kontenta malantaŭ mi.

Nun mi vidas instruiston Linnæus kun la reĝaj infanoj. Linnæus havas florojn en sia mano kaj nun li demandas pri la nomoj de la floroj! La reĝaj infanoj staras vice atendante kaj la instruisto demandas la infanojn unuope.

– *Kiu estas tiu floro, la instruisto Linnæus demandas.*

– *Ĝi estas blanka anemono, Gustaf respondas kaj Linnæus ĵetas la blankan anemonon trans sian ŝultron.*

– *Leontodo, Karl respondas kaj Linnæus ĵetas ankaŭ tiun floron trans la ŝultron.*

– *Kampanulo, Fredrik Adolf respondas kaj Linnæus ĵetas ...*

– *Lekanto, Sofia Albertina respondas kaj Linnæus ĵetas ...*

– *Kie estas Adolf Badin, demandas Linnæus. Kie li estas?*

– *Mi estas ĉi tie, supre en la pomarbo! Ĉu vi ne vidas min?*

Mi aŭdas de mia ŝtuparo kiel la infanoj respondas kaj la instruisto demandas. Subite granda krako ekaŭdiĝas ĉe la periferio de herbejo.

– *Bonvenon, Ulla Winblad kun amikino, Bellman vokas. Neniu somerfesto sen ĝojaj virinoj!*

Bellman komencas kanti kaj ludi denove.

– *Drinki post dek dua horo, vivi kune en frenezo...*

Kanto post kanto kaj baldaŭ mi vidas neniun, nur la malnovan ringon, kiu kuŝas sur la tablo en la vitroverando. Mi vidas kiel Lovisa Ulrika, sur la bildo de la ringo, palpebrumas al mi. Estas malhela nokto.

La somera festo estas je la fino precize kiel mia skribado.